# *Usono petas siajn civitanojn forlasi Irakon.*



Bagdado, 3 jan (RHK) La usona ambasadejo en tiu ?i urbo instigis siajn civitanojn forlasi Irakon tuj. Tiu ?i anonco okazis kelkajn horojn post atako per misiloj de Va?ingtono al la iraka ?efurbo, kiu mortigis la ma?oron generalon iranan Qassem Soleimani.

La peto anka? sciigas ke “?iuj konsulejaj operacioj publikaj estas nuligitaj pro la atakoj de milicoj subtenataj de Irano en la komplekso de la usona ambasadejo.”

La Pentagono asertis ke la atako estis farita “sub gvido” de la prezidento Donald Trump.

Siaflanke, la demokrata prekandidato Joseph Biden kritikas la prezidenton Trump pro tio ke li ordonis la murdon de la irana generalo Soleimani, kiun la defenda departemento akuzis pro “aktive evoluigi  planojn por ataki diplomatojn kaj membrojn de la sona servo en Irako kaj en la tuta regiono”.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/211044-usono-petas-siajn-civitanojn-forlasi-irakon

# Radio Habana Cuba